La kapo turniĝas al mi. Ĉu Ŝtefo aŭ Alan? Ĉu vivo kun la artisto aŭ instruistina harnodo? Ĉu Prago aŭ Čáslav? Alan ne ĉesis miri. – Kiel longe ankoraŭ vi intencas ĉi tiele iradi kun mi? Kiam vi volas al mi edziĝi?... Li estis nur je tri jaroj pli aĝa. Li estis same nematura kiel mi. Li ekhezitis – kaj tio sufiĉis. Ho, ni stultaj! Kvazaŭ amo atendus ĉe ĉiu angulo!

## Ankaŭ en Čáslav estis povraj infanoj

Kiomaĝa mi povis esti, eble kvin-sesjara. Paĉjo tenis min je la mano. La placo estis plena de homoj. Antaŭ ĉiu grupo parolis alia oratoro. Paĉjo klarigis al mi, ke okazos publika balotado kaj ke tiu sinjoro sur la tribuno estas deputito kaj sciigas al la balotontoj programon de la partio, kiun li reprezentas. Unu oratoro parolis precipe emfaze. La haroj faladis al li sur la frunton. Mi demandis paĉjon, kial tiu sinjoro koleras? – Tio estas komunistoj, ili volas ĉion tuje...

Ĵaŭde matene okupis la placon provincanoj. Bienmastrinoj el ĉirkaŭaj vilaĝoj ofertis al urbaninoj buteron, kazeon, ovojn, oni vendis freŝan legomon, sed ankaŭ vivan kortbirdaron, kuniklojn... Ĉi tie panjo aĉetis al mi belan buklohavan ŝafidon. Ĉiam ke ne, ke ne, kie ŝi prenus por tio, sed poste mi revenis el la lernejo kaj la ŝafido pokuras sur la korto! Kia ĝojo konduki ĝin ligitan per rimeno kiel hundeton sur la herbejo post nia domo. Domaĝe, ke la ŝafo estante sola senĉese blekis kaj blekis kaj ni devis adiaŭi ĝin...

De tempo al tempo okazis sur la placo de Čáslav la tiel nomita jarfoiro. Tio estis afero! Tio estis io por ni infanoj! Kiosko apud kiosko, konatoj, nekonatoj, koloraj balonetoj, fajfiloj... Glaciaĵo! Varmaj kolbasoj! Eble plej volonte mi observis papagon pretan por nura krono – konsideru, estimataj civitanoj, por nura krono – eltiri el longa vico da kovertoj tiun kun via sorto... Kaj ree: Glaciaĵo! Varmaj kolbasoj! Pli mave estis, kiam neatendite ŝanĝiĝis la vetero. Panjo trarigardis ŝtofojn dismetitajn sur grizaj tukegoj surtere, kiam

forte ektondris. Kaj jam iris tio ŝub, ŝub, vendistoj kunpakis la varojn, antaŭ ol ekpluvos...

Ne mankis kompreneble ankaŭ tiaj tagoj, kiam la placo de Čáslav estis absolute morta kaj kiam mi kaj mia pli aĝa fratino Hela vagadis de butiko al butiko dankaj por la plej sensignifa novaĵo. Kiu nin neniam trompis, estis kadristo Brabec. Foje li ekspoziciis en sia montrofenestro tre kuraĝan nudaĵon. Min senkulpan knabinon interesis, kial oni pentras tiom ofte senajn virinojn. Kial oni ne pentras senajn virojn? Hela ne povis tion klarigi al mi pli bone: Kio estas sur vira korpo? Nenio. Kelke da muskoloj. Dume virino – rigardu la liniojn, kiel agrablaj, molaj ili estas...

Ĉiujare antaŭ Kristnasko aperis sur la placo altega piceo ornamita per ruĝaj kaj bluaj skatoloj kaj paperĉenoj. Mi memoras, kiel senpacience ni atendis, kiam sur ĝi eklumos la lampoj. Fine tenebriĝis... Nun! Ĝi aspektis bele. Meze de la neĝo la radianta arbo. Iom deprime impresis la kaso por mondonacoj lokita sur eta tablo. Ankaŭ en Čáslav estis povraj infanoj...

La placo de Čáslav estas eksterordinare grandspaca. Tiun transiri! Ĝuste mi devus gvidi vin al la monumento de la armeestro Žižka. Kaj doni al vi fundan instruon. Bedaŭrinde en la historio mi estis de ĉiam febla. Anstataŭ tio mi invitas vin sur korson. Ja sur la larĝan trotuaron antaŭ Hotelo Grand, kie siatempe promenadis ni gimnazianoj. Kie ni serĉadis nin per la okuloj. Ke vin ne amuzus iradi tien reen? Ke vi ne komprenas? Almenaŭ vi vidas, kio iam sufiĉis al la junularo por feliĉo...

La lasta rememoro pri la unua respubliko, konkrete pri la placo de Čáslav – – Estas vespero la 29an de septembro 1938. La homamaso ariĝinta antaŭ la urbodomo ĵus elaŭskultis la verdikton de Munkeno. Britio kaj Francio promesis al Germanio nian limteritorion. Ni ne volas kredi al la propraj oreloj. Tia perfido! Voĉo portanta sin desur la balkono finis... Eksonis la himno. Ni staras senvorte, viroj kun deskovritaj kapoj, konsciaj pri la seriozeco de la politika situacio kaj pri tiu terura maljustaĵo. Tio estas ja la momentoj, kiam ni ĉeĥoj

Do tion ni havus. Ni eliris en la nokton. Subite tia aero! Ŝtefo zorgas, ke mi ne falu... Iu sub la influo de alkoholo ekploraĉas. Iu iĝas agresema. Mi tiras Ŝtefon flanken. – Ne nur hejme! Tuj! Ĉi tie ĉe tiu ĉi arbusto...

Ĉu tio ne estas terura? Estas milito, homoj mortas kaj ni... Sed ĉu ni scias, kio okazos morgaŭ, postmorgaŭ?

## "Vojo de ĝemoj"

Mi ĉiam asertis, ke la ebenaĵo ĉirkaŭ Čáslav estas monotona, nuraj kampoj, neniaj forstoj... Sed tuj post nia domo etendiĝis granda herbejo, kiom da leontodoj tie floris, kaj ĉe rojeto, kiu sin disverŝis tie, da kaltoj, man-atingi ilin ne estis facile, la grundo tiea estadis ŝlimiĝinta, kaj live sur milde leviĝanta deklivo kreskis ĉarmaj nigrablankaj betuloj kaj ankoraŭ plue faŭkis grejsa groto kaŝita post potencaj piceoj, sub kiuj eĉ dum blanka tago mistere krepuskiĝis... Foje mezvintre, dum dudekgrada frosto, mi staris tie kun Alan, eble horon ni staris tie premiĝante al ni...

Kaj estis tie fiŝlago kun kanoj, ĝis ni ĉiuvespere resonis kvakado de ranoj, tie mi foje nudpiede tretis limakon, fi! Kaj foje mi iris tiudirekte kun paĉjo kaj li komencis kanti, estas sane tiel traventumi al si la pulmojn... Ni kantis tiam, ĝis tio disaŭdiĝis... Tie inter beto kaj terpomoj kaj trifolio plena de burdoj... Kaj poste paĉjo distranĉis pomon, ĝi estas jam matura, havas brunan kernaron... Aĥ, mia kara paĉjo, li estis enkorpiĝinta boneco! Kaj tute fone sin trajtis fazanejo, tie mi foje observis etajn musojn, ili estis kiel kugletoj, kaj subite el la foliaro saltĵetis sin giganta kolubro kaj mi tiel terure ektimis, sed la musetoj kugletoj ĝustatempe perdiĝis en la tertruo, do mi trankviliĝis... Kaj kien vi rigardis, estis verde, sed la verdaĵo tie estis vere verda, ne tia polvumita kiel ĉi tie en Prago...

Sur la kontraŭa urbofino troviĝis la parkaĵo Vodranty. Agrabla, ombra, odora. Ho, mi pekulino! Anstataŭ partopreni la pianlecionon mi vagis tie kun notkajero subbrake. Mem-

komprene ne sola, sed akompanata de certa junulo, nu, ne tro eleganta... Ne pensu, ke pro ia avido! Simple mi ne kapablis lin rifuzi! Bonŝance la knabo respektis mian senkulpecon kaj nenio okazis... Kio estis nebona, ke pri mia stranga konateco eksciis paĉjo...

Ankaŭ mi estis tie kun mia kamaradino, mi ne plu scias, kiel nomiĝis la bonulo, kiu volonte sin oferis por nin instrui, laŭdire li ne povas rigardi tion, kiel naivaj ni estas... Jam vesperiĝis, kiam li komencis sian eksplikon... Tiam mi la unuan fojon ekvidis penison per la propraj okuloj... En la luna lumo ĝi aspektis preskaŭ monstre... Tion ĉi preni en la manon? Neniam! Ni ne povis ekkompreni tion. Tia peco devas eniĝi en delikatan inan korpon? Pro dio, kia sufero nin virinojn atendas!

Vodranty povus rakonti! La tuta Čáslav rendevuis tie! Ja estis en ĝi da iaj padoj kaj padetoj, nur esplori ilin, kaj diversaj solejoj, nur ilin aperigi! Unu vojo estis aparte bela. Oni diris al ĝi "vojo de ĝemoj". Borderis ĝin larikoj. Ambaŭflanke. Laŭ la tuta longo. Ĝuste tie, sur tiu vojo Alan konfesis al mi amon... Mi kion li serĉas en la poŝo kaj li havis en ĝi bukedeton da violoj. Li estis tiel ridinda kaj samtempe tiel kortuŝa, kiam li ĝin transdonis al mi kun la vortoj "mi amas vin"... Oni diras "bukedeto da violoj" kaj ĝi estis donaco. Ĝi estis mia plej granda travivaĵo el Vodranty...

## Kavan

La vortoj estis eldiritaj tiel neatendite kaj kun tia decidemo, ke tio konsternis min. Tio ne plu estis nuraj nubetoj, pli etaj, pli grandaj, kiuj inter nin enpaŝadis. Tio ĉi estis kvazaŭ fulmo. Kaj nur tial, ke mi ne volis al Ŝtefo perfidi, kien mi kaŝis la kafon. Nome li ĝin tute ne ŝparis kaj la provizo danĝere ŝrumpis. Kie mi poste akiros ĝin? Nenie! Kaj kiel multekosta ĝi estas! – Do vi ĝin al mi ne donos? – Ne... Ŝtefo fermis la pianon per energia albato. – Do mi iros al doktoro Kavan, por ke li disigu nin!